

oktobro 1969

62-a jaro

n-ro 767 (10)

esperanto

oficiala organo de
universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



Vi trovos

en nia oktobra numero, nun en viaj manoj, eĥojn ankoraŭ de la kongres-sezono. Ĉi-foje akcentiĝas la eventoj de la TEJO-kongreso en Tyresö, Svedujo, kaj de la dutaga Lerneja Konferenco, kiu sekvis tuj post la Universala Kongreso en Helsinki. Ambaŭ produktis siajn formalajn konkludojn; de ambaŭ ni pesas sur ĉi tiuj paĝoj (153, 158) la signifon por la movado.

Kiel duan ĉeftemon ni prenis kelkajn aplikojn de komputiloj al esperantologio, lasante flanken la demandon, ĉu ni ne preferu paroli pri komputeroj, ordinatoroj, komputeroj, kalkulaŭtomatoj aŭ alia inventaĵo de la terminaristoj.

Sur postaj paĝoj reaperas la regulaj rubrikoj prokrastitaj pro la preskaŭ-ekskluzive kongresa numero septembra. Pri la venonta, 55a Universala Kongreso la unua Oficiala Komunikado jam aperis (junio, p. 109); la dua aperos en novembro.

Ne ĉiuj landoj praktikas kalendaran abon-sistemon: de januaro ĝis decembro. Permesu do memorigi ĉi tie, ke nia abon-jaro finiĝas la 31-an de decembro. Se vi ne estas jam dumviva membro aŭ jam antaŭpagis por pluraj jaroj, ankaŭ via abono do baldaŭ finiĝos. Vi tre multe helpos nin, se vi pagos frue la kotizon por 1970! Antaŭdankon.

Enhavo

- 153 La signifo de la Deklaracio de Tyresö (TEJO)
- 153 Deklaracio
- 154 Komputiloj — helpilo de lingvistoj (Schlüter)
- 158 Lerneja Bulteno n-ro 15:
 - Rezultoj de la 3-a Lerneja Konferenco
- 160 Recenzoj
- 161 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj)
- 162 Nekrologoj (Ŝustr, Sakowicz, Väisälä, Falgier, Mello, Nix)
- 162 Turkoj en Nederlando
- 163 Leteroj de legantoj
- 164 Loke — Fake — Persone
- 164 Tutkorajn gratulojn kaj bondezirojn
- 166 La 25a jubilea kongreso de TEJO
- 166 Survoje al Vieno
- 168 Oficiala informilo n-ro 427
- 168 Anoncetoj

La kovrilo

"Egaleco" en la sveda lingvo kaj Esperanto, kaj svedlingva teksto "Malfermu la okulojn! Multlingveco estas realaĵoj!" aperis inter multaj sloganoj pri lingva diskriminacio kaj la Internacia Lingvo sur tabuloj portataj tra la centraj stratoj de Stokholmo dum la Internacia Junulara Kongreso de TEJO. La junaj kongresanoj ekspluatis la nuntempan kutimon de studentaj protestoj por fari rektan kontakton kun la publiko. Detaloj en "La Juna Vivo" sur paĝo 166.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭgusto)

Redaktoro: D-ro V. Sadler.

Abonprezo por unu kalendarajaro (1969): 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 25,— gld.); (1970): 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld.

Anonc-tarifo: 1 paĝo = 285 gld.; 1/2 p. = 150 gld.; 1/4 p. = 85 gld.; 1/8 p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝokostoj ekstreme. Ripet-rabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Girkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj lernejoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, Germanujo. Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: S-ro U. J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: S-ro J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris (17e), Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: S-ro J. Ułpiński, Str. KRN 1 m 41, Warszawa 1, Polujo. Estrarano pri financoj kaj administrado: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

La signifo de la deklaro de Tyresö



Humphrey
Tonkin, nov-
elektita
prezidanto
de TEJO

La ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso pritraktis la ĝeneralan temon "Junularo kaj Socio." En la nuna historia momento ĝi estas temo tre aktuala: ĉie en la mondo oni trovas inter la junularo novan memkonscion, novan maltrankvilon, novan skeptikecon pri establitaj normoj. En prelego post prelego, kaj en diskuto post diskuto, la kongresanoj revenis ĉiam al la sama konstato — la junularo timas la vojon, kiun nuntempe la homaro iras. Ek de la unua tago de la kongreso, en la inaŭgura parolado de la nova prezidanto de TEJO, Humphrey Tonkin, oni aŭdis la kialojn. La junularo vivas en mondo de politika mensogado, en ĉirkaŭaĵo detruata de ĥemiaj elfluaĵoj kaj neplanata urbigo kaj psika manipulado, kaj en socia kadro, kie la junularo estas konsiderata nur kiel ankoraŭ unu produktopovo, ankoraŭ unu konsumantaro.

La nerespondeco etendiĝas ĝis la lingva kampo. En la nomo de ekonomia progreso, tutaj socioj submetiĝas al korodaj fremdaj influoj kaj al detruado de la propra kulturo kaj la propra lingvo. La grandaj naciaj lingvoj fariĝis, en la manoj de lertaj ekspluatantoj, armiloj por perforta adaptado de malpli riĉaj kaj malpli fortaj popoloj al la bezonoj de fremdaj ekonomiaj maŝinoj.

En la nuntempa studenta kaj junulara ribelado, kaj precipe en la nova konsciigo de la junularo, la lingva, kaj kun ĝi la kultura, demandoj ne ricevis sufiĉan atenton. Dum multaj aliaj internaciaj junularaj organizoj grandparte perdis sian influon inter la aktiviĝanta junularo, pro ne-

kapablo adaptiĝi, TEJO konstatis, ke ĝi povas ludi rolon en la novaj cirkonstancoj, verŝajne eĉ pli influan ol antaŭe. Esperanto, per sia kontraŭstaro al la misuzo de naciaj lingvoj, kaj pro ĝia idealo de lingva egaleco, estas en si mem protesta lingvo. La esperantistoj kaj la junularo celas samajn aferojn. TEJO prenis sur sin la taskon emfazi tion.

Pro tio, la nuna Deklaracio. Ĝi neniel anstataŭas la ĝisnunan politikan neŭtralecon de TEJO. Neŭtraleco en la politika batalo inter la potencoblokoj estas vivneceso de nia organizaĵo. Sed samtempe oni povas konstati, ke la politika batalo mem estas simptomo de pli granda malsano — la nerespondeco de la homo rilate al lia homeco. En la batalo por homa respekto kaj la konservo de la individua personeco, TEJO ne povas resti neŭtrala. Ni diru, do, ke la Deklaracio paralelas kaj komplementas la politikan neŭtralecon.

Kion, do, la Deklaracio signifas! Ĝi signifas la sukcesan adaptiĝon de TEJO al la nuntempa junulara etoso; ĝi donas al niaj membroj novan kialon por la poresperanta laboro; kaj ĝi frontas la realojn de nia nuna kaj estonta mondo kun nova kuraĝo. Eble plej grave, ĝi montras la deziron de la junularo ekzameni la ecojn kaj la celojn de esperantismo por ĉerpi el ĝi la fortojn, kiuj jam subtenis la movadon tra okdek malfacilaj jaroj, kaj emfazas ilian kongruon kun la espero kaj aspiroj de la nova generacio.

DEKLARACIO

La 25-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, okazinta en Tyresö, Svedujo, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1969 kun ĝenerala temo "Junularo kaj Socio"

1. **studis** en pluraj prelegoj kaj diskutgrupoj la nuntempan radikalan ŝanĝon de la rolo de la junularo en la socio, kiu montriĝas en intelekta kaj politika mobilizo de la junularo.

2. **konstatis** la jenajn faktorojn:

a. La mobilizo okazas ĉefe pro sento, ke la libera evoluo de la individuo estas ĉiam pli kaj pli endanĝerigata de establitaj ordosistemoj.

b. La establitajn ordosistemojn subtenas du tendencoj — unue, malaktualaj kaj tro normigaj konceptoj pri la homo, due, la emo de rapide evoluanta teknologio detrui kaj anonimigi la individuecon, detrui la fizikan ĉirkaŭaĵon de la homo kaj subfosi la homan psikon.

c. La lingvo estas realaĵo intime ligita al aliaj sociaj kaj politikaj fenomenoj. Tial ĉiuj ajn aktivecoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj aktivecoj.

ĉ. Se oni konsekvence aplikas la koncepton pri konservo de la integreco de la individuo, oni nepre venas al malaprobo de lingva kaj kultura

diskriminacio en ĉiu formo, al malaprobo de ĉiu tiel nomata solvo de la lingva problemo, kiu baziĝas sur diskriminacio, kaj al konstato, ke la nuntempa fenomeno de detruado de la kultura kaj lingva fono de multaj popoloj ne estas sufiĉe atentata. Tiu detruado estas nenio alia, ol instrumento de lingva imperiismo.

3. **antaŭvidas** en la propra laboro esploradon kaj informadon pri la neadekvato de la monda lingva situacio, kaj pri ĝia kunligo kun la jam menciita detruo de la homa personeco en la nomo de teknologia kaj ekonomia progreso.

4. **deklaras, ke:**

a. La mobilizo de la junularo estas subtenenda kaj partoprenenda batalo por la digno de la homo.
b. La estonta agado de TEJO inkluzivas lanĉon de aktivecoj, kiuj celos plivastigi la dimension de la individuo en la socia kaj teknologia evoluo. Tiuj aktivecoj baziĝos sur la specialaj trajtoj de TEJO, kiel organizo laboranta por forigo de ĉia misuzo de lingvoj por ekonomia, kultura aŭ politika subpremado.

5. **alvokas** junajn homojn kaj junularajn organizojn al solidariĝo kaj laŭeble kunlaboro en tiu agado de TEJO.

Komputiloj — antaŭe nomataj elektronaj kalkulmaŝinoj — estis unue konstruitaj por solvi kompleksajn taskojn, kiuj konsistas el vico da unuopaj kalkulpasoj. La vicon de la necesaj paŝoj la komputilo povas "memori". Ĉe multaj taskoj la maŝino povas aŭtomate "decidi" inter du aŭ pli da memoritaj paŝvicoj, laŭ la evoluo de la problemo.

La unuaj uzantoj, kiuj havis tiajn problemojn, estis matematikistoj. Post la invento de rapidskribilo — kiu presas ĝis 2500 literoj en ĉiu sekundo — la komputiloj fariĝis uzeblaj ankaŭ por administraj taskoj, kiel fakturado, salajroj, librotenado. Hodiaŭ komputiloj estas granda helpilo por ĉia mensa laboro, precipe pro la metodoj de la numerita komputado.

Esperantistoj klopodas akomodiĝi al plej modernaj metodoj, por ke Esperanto restu moderna lingvo. Ni tial prezentu al ni, kiamaniere komputiloj helpas al lingvologiaj taskoj, por ekkoni, kiom ili jam helpis aŭ povus helpi al la Esperantologo.

La kapabloj de komputilo, eluzeblaj por lingvisto, estas: nombri; kalkuli; ordigi laŭ ia dezirata maniero; kunligi vortojn, ideojn, konceptojn laŭ certaj elektitaj vidpunktoj; kaj memori amasojn da informoj, por ilin aŭtomate serĉi kaj eldoni.

Nombri

La plej facila tasko de komputilo estas la nombrobrado. Ekzemple la aŭtoro analizis materialon konsistantan el la radikoj de Plena Vortaro, sesa eldono, inkluzive suplementon, kaj sciencaj kaj teknikaj afiksoj, la literoj de la alfabeto kaj la gramatikaj finaĵoj, entute 7883 radikoj. La komputilo nombris la oftecon de la unuopaj inter la 45 987 literoj uzitaj. Jen la rezulto:

A 4483	G 1081	K 2656	S 2042
B 897	Ĝ 141	L 2612	Ŝ 169
C 712	H 250	M 1926	T 3408
Ĉ 158	Ĥ 39	N 2944	U 1611
D 1367	I 4406	O 3251	V 732
E 3744	J 233	P 1676	Z 509
F 916	Ĵ 38	R 3986	

Interesa en la rezulto estas la relative malofta uzado de la literoj kun supersignoj. Esperantologon certe ankaŭ interesus la ofteco en kuranta teksto. Same signifoplena estas la elnombro de vortoj en apartaj tekstoj, ekz. por kompili lernolibrojn. La komputilo povas mem starigi la vortliston en sinsekvo de ofteco. Ĝi ankaŭ eltrovas neologismojn. Aliaj lingvoelementoj estas same nombreblaj: longeco de vortoj laŭ literoj kaj laŭ silaboj, longeco de frazoj, nombro de finaĵoj; eble tiuj elementoj mezuras la stilon de diversaj aŭtoroj.

Kalkuli

Pli detalaj stilkritikaj esploroj tamen devas eluzi la kalkulan kapablon de la komputilo. Esploradoj

Komputiloj (elektronaj cerboj, se vi preferas) jam faris revolucion en multaj fakoj de la vivo: en matematiko kaj natursciencoj, en librotenado kaj administrado. Laste ankaŭ la lingvistiko, kiu estas hodiaŭ multe pli rigora scienco, ol antaŭ kelkaj jardekoj, komprenis la avantaĝojn de tiaj maŝinoj. En sia artikolo d-ro Schlüter, konsilanto ĉe IBM, montras, kiel komputiloj povus helpi ankaŭ al la pristudo de Esperanto.

Klaus Schlüter


Foto: IBM/
Hans Paysen

montris, ke kelkaj statistikaj ciferoj — ekzemple la koeficiento de aŭtokorelacio — uzante vortlongecon, silabnombron, frazlongecon, ritmon aŭ distancon inter uzoj de samaj vortoj ktp. — estas tipaj por certa aŭtoro. En tasko de aŭtor-atribuo komputilo unue helpas elserĉi tiujn faktorojn, kiuj plej decide distingas inter la koncernaj aŭtoroj; poste ĝi analizas duban tekston por eltrovi, al kies stilo ĝi pleje similas. Tiel ĝi permesas atribui de la aŭtoreco kaj donas samtempe la procenton de verŝajneco, ke tiu atribuo estas ĝusta. La usona lingvisto McDonough uzis tiun metodon por argumenti, ke Iliado devas esti verkita de unu aŭtoro, de Homero, kontraŭe al asertoj, ke ĝin verkis tuta teamo da grekaj aŭtoroj.

Ordigi

Pli multnombraj estas la aplikoj de la ordiga kapablo. La aŭtoro ekzemple uzis komputilon por kompili "Inversan Vortaron" de la Esperantaj

KOMPUTILOJ - HELPILO DE LINGVISTOJ



radikoj. Ili estas presitaj laŭ la alfabeto vico de la lasta, antaŭlasta, triaŭlasta ktp. literoj; por faciligi la serĉon, la vortoj staras kun glata dekstra rando en ĉiu kolono. En tiu ordo, la rimantaj vortoj troviĝas kune. Tia vortaro ne nur estas valora helpo por la Esperanta poeto aŭ tradukanto de versoj, sed ankaŭ por Esperantologoj, kiuj ekz. interesiĝas pri vortoj samfinaj kiel sufiksoj (ekz. modulo, kampanilo); aŭ por la ofteco de pseŭdosufiksoj (ekz. oni ekkonas, ke "-logio" okazas 57foje, "-grafio" 30foje). Oni esperas, ke tiu valora broŝuro estos baldaŭ eldonita de germana eldonejo.

Tute alia apliko de la ordigado estas la "elektrona kompostado", pri kiu "Revuo Esperanto" raportis en 1966, paĝo 88. Ĉi-tie ne temas pri alfabeto vicigo, sed pri la aranĝo de vortoj tiel, ke ili bone plenigas preslinion kaj prespaĝon.

Ofta laboro de lingvista esploristo estas la kompilado de konkordanco. Tiel oni nomas ampleksan vortliston de ĉiuj vortoj uzitaj en certa verko, ekz. la Biblio. La vortoj estas metitaj en alfabeto vico. Ĉiu vorto okazas tiel ofte, kiel ĝi estas uzita en la verko. La konkordanco enhavas ĉie la kuntekston: la tutan frazon, en kiu la vorto okazas, aŭ almenaŭ kelkajn vortojn antaŭ kaj post la koncerna ŝlosilvorto, kun cito de la trovejo. Konkordancoj servas al precizaj esploroj de la signifonuancoj de vortoj. Eĉ se oni ellasas oftajn vortojn kiel "la", "kaj", "de" ktp., la listo estas ampleksega. Ekzemple por kompili la konkordancon de la angla poeto Wordsworth, eldonita ĉirkaŭ 1910 de profesoro Lane Cooper, 50 helpantoj bezonis 6 monatojn. Kun komputiloj eĉ konkordanco de la tuta verkaro de Zamenhof estas atingebla por lingvologo, kiu disponas pri komputilo dum nur kelkaj horoj (kaj pri tajpistinaro por truigi la koncernajn tekstojn).

Speciala, tre utila speco de konkordanco estas la KWIC-indekso ("keyword-in-context index"): la vortoj de titoloj estas ordigataj en alfabeto sekvo. Ĉar ĉiu titolo aperas en la listo plurfoje, tia indekso estas pli praktika ol la kutimaj, permane kompilitaj. Por montri specimenon, mi komputis la titolojn de gravaj artikoloj de Revuo Esperanto januaro ĝis aŭgusto 1969 laŭ tiu metodo. (Vidu denove p. 156.) Estus tre utile, se iu centra instanco regule eldonus tian indekson pri artikoloj de la tuta Esperanta gazetaro.

Kunligi

Ekzempla apliko de la kunliga kapablo de komputilo estas la aŭtomata tradukado, pri kiu "Esperanto" raportis en 1967, paĝo 2. Ankaŭ hodiaŭ oni ne multe progresis en tiu kampo, kvankam nun jam ekzistas pluraj funkciaj programoj por lingvoparoj.

Ĉar la industrio sentas mankon de faktradukistoj, oni serĉis komputilan metodon por almenaŭ helpi en traduktaskoj. La eŭropaj kompanioj de IBM (en ĝia hejmlando Usono la problemo ja ne tiom urĝas) tiucele starigis la projekton "Babylon". Ĝi ampleksas la kompiladon de plurlingvaj fakvorta-

Ekzemploj de komputlaboro pri Esperanto

Almenaŭ sesfoje en la historio de la Internacia Lingvo entuziasmaj versfarantoj dediĉis monatojn da peniga laboro por ellabori ĝisdatan vortaron de Esperantaj rimoj — t.e. vortaron, en kiu la vortoj estas ordigitaj ne laŭ la komencliteroj, sed laŭ la finlitteroj. Komputiloj kapablas fari, kaj efektive jam faris, la saman laboron en nur malgranda ono de tiu tempo.

Malsupre: specimena depresaĵo el la komputilo en formo tuj utiligebla.

RIM-VORTARO DE LA SESA ELONO KUN SUPLEMENTO DE PV

AGEND	TRIOD	TARD
LEGEND	JOD	PETARD
MULTIPLIKEND	KOD	BASTARD
KALEND	LOD	MUSTARD
BLEND	EKSPLD	STEVARD
PLEND	MOD	BULVARD
MEND	KOMOD	HAZARD
AMEND	AKOMOD	
REKOMEND	NOD	PERD
PEND	ANOD	VERD
SEND	SINOD	
TEND	MIRIAPD	BIRD
ATEND	ANTIPOD	
ETEND	CEFALOPOD	ORD
PRETEND	KLOPOD	BORD
VEND	GASTROPOD	BABORD
LAVEND	ROD	TRIBORD
	MAROD	AGORD
IND	BROD	HORD
BIND	EROD	FJORD
BLIND	KOROD	KORD
PIND	ELEKTROD	AKORD
TAMARIND	SOD	REKORD
S.IND	RAPSOD	KONKORD
VIND	KATOD	LORD
	METOD	MORD
OND	LEONTOD	NORD
VAGABOND	EPIZOD	PORD
FOND		TORD
BLOND	ARD	DISTORD
MOND	BARD	
RESPOND	HALEBARD	BURD
KORESPOND	BOMBARD	GURD
ROND	LOMBARD	HURD
FROND	PILC.ARD	MURD
SOND	STANDARD	SURD
TOND	GARD	ABSURD
ROTOND	RIGARD	TURD
	AVANGARD	
ABUND	ARTERGARD	AUD
FUND	HARD	J.AUD
PROFUND	MILIARD	LAUD
HUND	JARD	ALAUD
FEKUND	KARD	PLAUD
SEKUND	PERIKARD	APLAUD
LUND	BRANKARD	FRAUD
INUND	ENDOKARD	STAUD
PUND	KOKARD	BUD
GRUND	LARD	FEUD
HIRUND	BILARD	FREUD
KORUND	BOLARD	PSEUD
VUND	FULARD	JUD
	MARD	J.UD
OD	NARD	ESKUD
GEOD	PONARD	LUD
ES.AFOD	GURNARD	ALUD
EFOD	BOARD	PRELUD
PAGOD	GEPAOD	KONKLUD
DIOD	LEOPARD	ESKLUD
PERIOD	MANSARD	EKSKLUD

KWIC INDEX

ALVOKO	AL UNUOPAJ ESPERANTISTOJ.#	P	10
ALVOKO	AL UNUOPAJ ESPERANTISTOJ.#	P	10
HEJMA	BANEJO.#	P	56
GRAVA	BEZONO DIDAKTA LITERATURO.#	P	116
LA UNUA JARKVINO	DE KONTAKIO.#	P	97
LA SENCO	DE LA NUNAJ ELEKTOJ.#	P	21
TURKU URBO	DE LA OFICIALA POSTKONGRESO.#	P	8
DE PRINTEMPO. NEKROLOGO	DE LA PROZISTO.# LA GHOJOJ	P	82
PORTLAND OREGON URBO	DE LA 57A UK.#	P	63
TO.# LA GHOJOJ	DE PRINTEMPO. NEKROLOGO DE LA PROZIS	P	82
RELIGIA NEUTRALECO	DE UEA.#	P	124
GRAVA BEZONO	DIDAKTA LITERATURO.#	P	116
	EL JUGHEJA KRONIKO SHERCO .#	P	106
LA SENCO DE LA NUNAJ	ELEKTOJ.#	P	21
LA KNABO	ELIEZER. LA KORVO.#	P	120
VINTRO	EN FINNLANDO.#	P	44
ION SKRIBIS LA GAZETARO	EN 1968.# K	P	119
PROGRESAS LA	ENCIKLOPEDIO.#	P	127
ALVOKO AL UNUOPAJ	ESPERANTISTOJ.#	P	10
	ESPERANTO POR LA TURISMO.#	P	4
FORTA UEA	ESTAS FORTA MOVADO.#	P	73
VINTRO EN	FINNLANDO.#	P	44
KION PAROLAS	FINNOJ.#	P	54
FORTA UEA ESTAS	FORTA MOVADO.#	P	73
	FORTA UEA ESTAS FORTA MOVADO.#	P	73
KIEL	FRONTI INTERVJUISTON KONSILLOJ.#	P	6
KION SKRIBIS LA	GAZETARO EN 1968.#	P	119
PROZISTO.# LA	GHOJOJ DE PRINTEMPO. NEKROLOGO DE LA	P	82
	GRAVA BEZONO DIDAKTA LITERATURO.#	P	116
	HEJMA BANEJO.#	P	56
	ILO SOJARA.#	P	100
KANARIOJ PONTO	INTER KONTINENTOJ.#	P	104
LENIN KAJ LA	INTERNACIA LINGVO.#	P	24
KIEL FRONTI	INTERVJUISTON KONSILLOJ.#	P	6

Supre: parto de speciala indekso de la artikoloj, kiuj aperis en "Esperanto" de januaro ĝis inkluzive juli-aŭgusto 1969. Tia indekson, en kiu ĉiu vorto de ĉiu artikolo-titolo aperas en sia alfabeto loko kaj en sia kunteksto, komputilo kompilas kaj presas tute aŭtomate. "KWIC" = "ŝlosila vorto en kunteksto".

roj, aŭtomate alfabetigante laŭ ĉiu el la multaj uzataj lingvoj (ĝis 12). Al la decido pri la elekto de fakvortoj helpas konkordancoj. La ĉefa trajto de la projekto estas helpi al faktradukistoj per tekstkronologiaj terminaroj. Kontraŭe al kutimaj alfabetaj vortaroj, ĉi tiuj estas speciale verkataj por ĉiu teksto, kaj la terminoj aperas en la sekvo, kiel la tradukisto ilin bezonas, legante la tekston. Ili do ankaŭ povas okazi plurfoje. La avantaĝoj estas, ke la tekstkronologia ŝparas al la tradukisto la serĉon en vortaroj, kio kutime okupas grandan parton de lia tempo. Krome ili donas nur la tradukon en la koncerna faklingvo kaj ne la apudajn signifojn. Ĉe la sama termino ili daŭre donas identan tradukon — tial ili estas tre taŭgaj por teknikaj priskriboj, uz-informoj ktp., kiel oni deziras normigon de la uzataj esprimoj.

Por la kompilado de leksikono komputilo estas preskaŭ ne malhavebla. Dum kutime plurvoluma eldono aperadis dum jaroj, la klientoj hodiaŭ deziras ĉiujn volumojn samtempe. Komputilo zorgas por la ĝusta vico de la ŝlosilvortoj, por evito de duoblaj mencioj kaj por tio, ke sekvante la indikon "kp." (komparu) vi tie ankaŭ trovos kompareblan priskribon. Tio validas por unulingvaj leksikonoj, kiel la aperonta PIV (kie, laŭ mia scio, ĉiuj preparlaboroj estas farataj permane), kaj ankoraŭ pli por du- aŭ plurlingvaj vortaroj.

Hodiaŭ aperadas tia amaso da fakartikoloj en ĉiu lingvo, ke sciencisto devus legi dum pli ol

24 horoj ĉiutage por nur scii pri la plej gravaj! Tial tre necesas mallongaj resumoj pri la enhavo de teksto. En kelkaj landoj estas kutimo, ke aŭtoro kunliveras resumon, presotan antaŭ la koncerna artikolo; en aliaj, tiun devas verki la redaktoro. Por faciligi la taskon, oni esploras pri metodo, per kiu la komputilo povas elserĉi el teksto la plej signifoplenajn frazojn kaj kunligi ilin al aŭtomata resume. Komparante ĝin kun la "profilo de intereso" de sciencistoj, ĝi en ampleksa distribusistemo de informoj atentigas speciale tiujn legantojn, kiuj en pasinteco montris intereson por tiu temo. Tiel la komputilo helpas solvi la problemon, ke oni estas superŝutata per tro multe da neinteresaj informoj.

La plej alta formo de la kunligo de ideoj aŭ vortoj estas la poezio, kaj en tiu ĉi artikolo ne manku kelkaj vortoj pri la komputilo kiel helpilo de poeto. Fakte estas jam publikigitaj poemoj el komputiloj, eldonitaj ekz. de la germanaj komputilistoj Stickel kaj Lutz. Stickel mem skribas pri tiuj poemoj: "Homo, kiu verkas tekston, sinsekve elektas lingvajn elementojn el la diversaj eblecoj en la lingvo. Per la maniero de elekto li esprimas sian komunikan intencon. Ĉar komputilo, direktita sole per programo farita de homo, ne povas el si

mem disvolvi intencojn, la konscia elekto de lingvaj elementoj estas anstataŭata per la hazardo. Tiel neniu produktita teksto samas al antaŭa aŭ posta. . . . La maniero de la tekstproduktado montras, ke oni apenaŭ povas atribui al la maŝino la aŭtorecon de la poemoj. . . . (Sed) se lirikisto uzus komputilon por sin inspiri per la kombina ludo kun novaj vortsekvoj kaj ritmaj formoj por sia propra laboro, tio ne estus minaco al la poeta arto fare de la maŝino, sed nur alia formo de arta eksperimento."

Eble interesas la Esperanta traduko de unu el la Stickelaj komputilaj poemoj, verkita en 1/4 sekundo de IBM 7090 per hazarda elekto el 1200 vortoj kaj 280 frazspecimenoj:

Aŭtopoemo 303

Kiam ludas malheleco, rigidiĝas vespero
Oro kaj beleco estas kelkiam radiaj
Mi dancas kaj reflektas
Ofte tuŝas min la herbo
La sonorilo kreskas malglate kaj ore
Vojetoj kaj senditoj estas ventegaj —
Kiu kisas planton?
La poeto

Memori


Sed ni reiru al grava temo: la apliko de la komputila memorkapablo. Ĝi ludas rolon en ĉiuj menciitaj aplikoj, sed plej tipa ĝi eble estas en la dokumentado. Por montri ekzemplon, mi sciollis, kiom scias la aŭtomata dokumentejo de IBM en La Gaude, Francujo, pri la Internacia Lingvo. Mi demandis pri "Esperanto or international or auxiliary or world languages or English language and international relations" kaj ricevis, krom kelkaj mencioj de komputilaj kodlingvoj, nur la resumon de unu artikolo "English spoken — here, there, everywhere" de Benton. Certe se CED uzus mem tian maŝinon, la rezulto de tiu serĉo estus alia.

Bedaŭrinde ĉiuj priskribitaj eblecoj estas por ni malfacile atingeblaj, ĉar antaŭ la duobligo de nia membronombro ni ne povas atendi, ke UEA instalos tiel grandan komputilon, ke ĝi taŭgos por la kontotenado pri membroj kaj por ne-numeraj aplikoj. Kaj nur malmultaj Esperantologoj havas la eblecon senkoste uzi fremdan, ekz. universitatan, maŝinon.

Sed al la celo multobligi la adeptojn de la Internacia Lingvo eble helpas la lasta uzeblo de komputilo: tiu kiel instrumaŝino. Kiam unu instruisto estos farinta lernprogramon por Esperanto, poste centmiloj da lernantoj povos sidi antaŭ lernstacioj konektitaj kun la komputilo — tiaj, kiajn laŭ opinio de futuristoj jam havos ĉiu familio en sia hejmo — kaj ricevi individuan instruon, kvazaŭ de privatinstruisto. La komputilo, ĉar ĝi analizas erarojn de la lernanto, taŭgas pli ol la jam kutimaj lingvo-laboratorioj sur bazo de sonbend-aparato. Pro la altaj kostoj la metodo ĝis nun estas uzata nur en la industrio por lernigi novajn faktemojn, por kiuj mankas la instruistoj. Sed tia ja estas ankaŭ la Internacia Lingvo.

La vasta memorkapablo kaj alta rapideco de komputiloj ebligas utiligi ilin ankaŭ kiel instru-maŝinojn. Ĉi tiu knabineto lernas la alfabeton sen instruisto. (Foto: IBM)





REZULTOJ

de la 3-a Lerneja Konferenco

Tuj post la 54-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en la modernega kongresejo "Dipoli", Otanlemi apud Helsinko, la Tria Lerneja Konferenco, organizita de la Konsulta Komisiono pri Lernejoj (KKL) de UEA. Proksimume 100 delegitoj de registaroj kaj esperantistaj asocioj, en ĉeesto de finnlanda parlamentano (parolanta Esperanton) kaj ataŝeoj de la pola kaj itala ambasadoj, diskutis la problemaron de Esperanto-instruado en lernejoj. Prezidis s-ro Toczyski (gvidinto de KKL) kaj, la duan tagon, prof. Lapenna. La Konferenco akceptis jenajn du dokumentojn: (1) La **KONKLUDOJ** estas destinitaj por interna uzo de la esperantistaj asocioj cele al plintensigo de la agado sur lerneja kampo; (2) la **REZOLUCIO** estas direktita al la ekstera mondo, precipe al ĉiaj instancoj rilatantaj instruadon.

KONKLUDOJ

PRI LA EBLECOJ POR LA PARALELA ENKONDUKO DE ESPERANTO AL LA LERNEJOJ KAJ UNIVERSITATOJ DE DIVERSAJ LANDOJ

La Tria Lerneja Konferenco, kiu okazis en Helsinko la 3-an kaj 4-an de aŭgusto 1969 kaj kiun partoprenis delegitoj de 17 Landaj Asocioj de UEA (Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Germanujo, Hungarujo, Israelo, Jugoslavio, Kanado, Nederlando, Norvegujo, Pollando, Svedujo, Svislando, kaj Usono) kaj de 12 Landaj Sekcioj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (Aŭstralio, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Nederlando, Pollando, Svedujo, Svislando kaj Usono) kune kun oficialaj reprezentantoj de 7 registaroj (Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Finnlando, Italujo, Pollando kaj Svedujo) pritraktis kiel ĉefan temon la eblecon por vastigo de la instruado de la Internacia Lingvo (Esperanto) en diversaj landoj per interŝtata konvencio pri paralela enkonduko de la instruado de tiu lingvo en difinitan nombron da lernejoj kaj universitatoj.

La Konferenco aŭdis la raportojn de (1) lernejestro Raif Makarian, ERD, MA (Britujo) pri la juraj eblecoj por Esperanto-instruado en 25 landoj, (2) rektoro Helmut Sonnabend (Germanujo) pri la instruado de Esperanto en la jaro 1968/69, (3) prof. d-ro Ivo Lapenna (Britujo) pri la instruado de Esperanto sur universitata nivelo, (4) s-ro Günther Becker (Germanujo) pri la kunordiga rolo en Esperanto-instruaferoj de la Konsulta Komisiono pri Lernejoj (KKL) de UEA.

La Konferenco diskutis tiujn raportojn kaj traktis lastatempe verkitaĵojn dokumentojn de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono,

kiuj rilatis al la konferenca temo. Ĝi poste diskutis la eblecojn de diversaj landoj partopreni en interŝtata konvencio aŭ alia internacia interkonsento pri la enkonduko de Esperanto al la lernejoj, kaj pri la eblecoj por vastigo de la instruado de tiu lingvo sur landa nivelo.

Kvankam pluraj landaj aŭ registaraj reprezentantoj povis certigi la aktivan intereson de siaj landoj pri la ideo de la paralela enkonduko de Esperanto-instruado — ne nur simple kiel aldona fremda lingvo, sed pli bone kiel unika helpilo al edukado al internacia interkompreniĝo — la Konferenco tamen

KONSTATIS, ke ankoraŭ ne alvenis la ĝusta momento por la traktado de formala interkonsento, kvankam oni daŭre studu la terenon tiurilate, aparte en landoj, kie kondiĉoj povos en baldaŭa estonteco esti favoraj, kaj REKOMENDAS, ke la ĉefa agado en la esperantista instruista medio, por la venontaj monatoj, estu la enlanda vastigado de la instruado mem per:

- (1) la enkonduko de Esperanto al la studprogramoj de ĉiam pli kaj pli da lernejoj, inkluzive tiujn por estontaj instruistoj;
- (2) la oficialigo, flanke de edukministerioj, de ĉiunivelaj studprogramoj;
- (3) la certigo al gelnantoj de Esperanto de taŭgaj ekzamenoj, diplomoj k.s. same kiel ili spertas kaj ricevas por aliaj lernejaj temoj;
- (4) la oficialigo, flanke de edukministerioj, de jam ekzistanta supera ekzameno, en kiu devas sukcesi eventuala Esperanto-instruisto, aŭ la starigo de tute novaj ekzamenoj por estontaj Esperanto-instruistoj — se eble en kunlaboro kun la edukministerio mem;
- (5) la eldonado, en ĉiu lando, de instrumaterialoj kaj lernolibroj modernaj laŭ aspekto kaj enhavo, kiuj baziĝas sur la oficialaj instru-programoj;
- (6) la pligrandigo de la reto de Esperanto-instruantaj lernejoj, kiuj partoprenas la projekton de Unesko "Asociiĝintaj Lernejoj";
- (7) la plifortigo de la kondiĉoj favoraj al la plua enkonduko de Esperanto, se necese per leĝa dekreto, laŭ la modelo de la aktuala agado en Italujo, unu el kies bazaj paŝoj estas la intensa kaj regula informado al gravaj oficistoj, parlamentoj ktp.;
- (8) la utiligado, aparte en universitataj medioj, de la nova revuo "La Monda Lingvo-Problemo";
- (9) la starigo de lernejaj komisionoj precipe en landoj, kie ne estas ILEI-sekcioj;
- (10) la harmoniigo de la laboro de la KKL, ILEI kaj la Landaj Asocioj;
- (11) la utiligo por la preparado de kompetentaj instruistoj, de ĉiuj modernaj rimedoj inkluzive

kursojn per radio, televido kaj gazetaro kaj de korespondaj kursoj por Instruistoj sub la gvido de la landaj Esperanto-asocioj;

(12) la uzado en Esperanto-instruado de la plej modernaj metodoj kiel uzataj en la instruado de ĉiuj modernaj lingvoj;

(13) kunlaboro de la landaj Esperanto-instruistoj kun la neesperantistaj instruistaj sindikatoj.

REZOLUCIO

PRI LA PARALELA ENKONDUKO DE LA INTERNACIA LINGVO (ESPERANTO) EN DIVERSAJ ŜTATOJ SURBAZE DE INTERŜTATA KONVENCIO.

Aŭdinte la raportojn kaj konstatinte ke:

1. konforme al la leĝoj kaj dekretoj reguligantaj la edukan sistemon la Internacia Lingvo Esperanto estas instruata en aro da elementaj, mezgradaj kaj superaj lernejoj kaj universitatoj de 31 landoj, kaj

2. la instruado de la Internacia Lingvo ĉiam pli efike servas al edukado por internacia interkompreniĝo,

la konferenco apelacias al la instancoj respondecaj pri la instruado kaj edukado en la diversaj ŝtatoj

VASTIGI la instruadon de Esperanto en la lernejoj, kaj

PRIKONSIDERI subskribon de interŝtata konvencio aŭ alia interkonsento pri laŭgrada enkonduko de la Instruado de la Internacia Lingvo en parton de lernejoj paralele en pluraj ŝtatoj.

Kvankam la tri supre menciitaj CED-dokumentoj pri (1) la jura situacio de Esperanto-Instruado, (2) la instruado de la Internacia Lingvo dum 1968/69 en elementaj kaj mezgradaj lernejoj kaj (3) la universitataj kursoj, lektoratoj kaj katedroj estas jam tre inform-riĉaj, ili tamen ankoraŭ ne estas kompletaj. Bedaŭrinde multaj demanditoj ne respondis. Tial KKL insiste petas ĉiujn, kiuj disponas pri ĉi-temaj informoj kaj ne jam transdonis ilin, komuniki ilin tuj al la prilaboranto, s-ro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11 a, 3161 Dollbergen, FRG.

Krome kaj fine, ni alvokas la partoprenintojn de la Konferenco sendi detalajn kritikojn pri ĝi al la CO de UEA.

ujm

Oficiala instruprogramo

La Ministerio por Klerigo kaj Superaj Lernejoj de Pollando aperigis en tiu ĉi jaro 20-paĝan broŝuron, A-5-formatan, kiu enhavas Instruprogramon de Esperanto, aprobitan la 22-an de decembro 1967 (referenco: Nr PRL-4120-Esp.-2/67). La projekton de la nun oficiala programo verkis Andrzej Pettyn. Tiu ĉi dokumento estas disponebla ankaŭ en Esperanto-traduko, aperigita de Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna 6, Varsovio.

La dokumento komenciĝas per tre atentinda konstato: "La kono de Esperanto havas grandan signifon en la nuntempa mondo." La programo listigas la instruendan lingvomaterialon de tri lernejaroj (semajnaj Instruhoroj: 3 - 2 - 2). Ne povante analize prezenti ĝin ĉi tie, ni nur notu,

ke tiu ĉi programo celas instruadon de proksimume 1 400 vortoj. La longa ĉapitro "Rimarkoj pri la realigado de la instruprogramo" estas tre utila metodika helpilo.

Estas nepre konsilinde, ke tiuj instruistoj, kiuj okupas sin pri ellaboro de instruprogramo (evidente konforma al la cirkonstancoj de la unuopaj landoj), petu ekzempleron de tiu ĉi dokumento kaj interkonsiliĝu kun ties aŭtoro.

Nova Pedagogia Revuo aperos

La komitato de ILEI decidis dum la jarkunveno en Helsinki aperigi novan pedagogian fakgazeton — oficiala organo de la Ligo. Per ĉi tiu paŝo ILEI montras sian fortan volon kiel memstara organizaĵo ŝultro al ŝultro kun UEA atingi nian celon, t.e. ĝenerala enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn. Sciante la malfacilaĵojn aperigi novan pedagogian revuon, sed sentante la altegan gravecon posedi propran organon oficialan, la komitatanoj de ILEI unuanime aprobis la planon, eldoni la fakgazeton kiel proponis la estraro. La plano estas, ke ĝi fariĝos la pedagogia forumo, sur kiu estu diskutataj ĉiuj pedagogiaj demandoj de nia epoko. Senprecedence ĝi povas esti helpo por formi komunan pedagogian mondkoncepton, ĉar fine ĉiu edukado celu la homon. La ĉiamdaŭra ekzistado teknike estas certigita. Ekzistas interkonsento kun ĉiuj landaj sekcioj de ILEI, laŭ kiu ili devigis sin sendi 2 ĝis 3 artikolojn jare.

La nova gazeto ricevis sian tradician nomon: Internacia Pedagogia Revuo. Estas antaŭvidite, ke ĝi aperu trifoje jare. Kiel eldonisto transprenis la financon flankon sinjoro Ludwig Pickel, rektoro Helmut Sonnabend la laboron de la redaktoro. Meze de januaro 1970 aperos en kvanto de 2000 ekzempleroj la gazeto kiel provnumero. Dum la unua numero povas esti presita en Germanujo, la dua verŝajne aperos en Polujo, ĉar tiamaniere ĉiuj geinstruistoj povos mendi la gazeton. Kiu nun deziras esti konstanta kunlaboranto, kaj kiu volas kunhelpi per abono, bonvolu direkti sin al: rektoro Helmut Sonnabend, 3161 Dollbergen, Im Eckerkampsfeld 11a, Germanujo.

KONSULTA KOMISIONO PRI LERNEJOJ

La estraro de UEA, en Helsinki, modifis la konsiston de la KKL, kies membroj estas nun:

Günther Becker, Alter Hangarten 2, 6653 Blieskastel, FRG; gvidado de la komisiono;

Raif Markarian, 87 Sebastian Avenue, Shenfield, Brentwood, Essex, Britujo; pedagogiaj aferoj;

Uwe Joachim Moritz, Andreasstr. 57, 5161 Merken, FRG; redaktado de la "Lerneja Bulteno", lerneja junularo;

Andrzej Pettyn, Kosciuszki 24, Milanówek (Warszawa), Pollando; instruprogramoj, lernolibroj;

Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11 a, 3161 Dollbergen, FRG; organizaĵaj aferoj.

Se vi havas iajn demandojn, kritikojn kaj kontribuojn, bonvolu skribi rekte al la kompetentulo.

Du disko-recenzoj

Fidinda rakonto

Recenzas André Ribot (Francujo):

Kiel pereis la familio de doktoro Zamenhof. Kō-zōji, Japanujo: Amo-Akademio, (1969). Disko 33 t/m. Ø 18 cm. Duflanka. (La voĉalbumo de Esperanto, 5-6). Kun presita teksto.

Tiu disko estas la tria en serio, kiu, sub la nomo "La voĉalbumo de Esperanto", intencas liveri la voĉojn de la pioniroj de nia movado. Tiu disko prezentas du tre malsimilajn flankojn; sur la unua, parolas mag. Isaj Dratwer, antaŭa prezidanto de Israela Esperanto-Ligo, por detale reĝustigi la cirkonstancojn de la perejo de la familio de d-ro Zamenhof, en Varsovio dum la ekokupo de Polujo fare de la germanoj. Tiu rakonto estas interesa kaj meritas viciĝi inter la fidindaj dokumentoj por la historio de d-ro Zamenhof kaj lia familio. Sed la aŭskultado de la dua flanko mirigas, ĉar tute ne temas pri la anoncita temo de la disko. Parolas prof. Miguel Sancho-Izquierdo kaj f-ino Inés Gastón pri neoriginalaj kaj ofte ripetataj temoj. **Mendu ĉe UEA:** 2,50 gld. + sendokostoj 10 %.

Valorus reeldoni

Recenzas Nikolaj Rytjkov (London):

El Esperantujo; Philipp Zeska, Burgtheater Wien, rakontas kaj recitas poezion. Wien: Aŭstria Esperantista Federacio, (1968). Disko duflanka, monofona. 45 r/m. 18 cm. (B.I.E.M. - PR-ESP-). Kun teksto.

Zamenhof skribis, ke nenla teoria parolado pri Esperanto povas tiel bonege efiki, kiel aktorado en Esperanto. Deklam-recita sondisko "El Esperantujo", eldonita de Aŭstria Esperantista Federacio, estas bonega — enhave: Kalocsay, Boulton, Kabe... La sinsekvo de la eroj estas modela: de liriko — al humuro, de poezio — al prozo.

La recitisto Philipp Zeska (Viena Urba teatro) majstras sian metion. Sed li ne regas Esperanton. Lia prononco kurioze memorigas tiun de komencanto germana aŭ/ kaj hungara: "senĉeza, eksceza, zemo, ŝar, Ojropo"; hungareske trofermitaj vokaloj (la e iĝas simila al i kaj la o — al u); lia akcento ofte antaŭas la Esperantan: "ĉekvidis, rēnversiĝis"; estaĵo sonas kiel "etago", "Ĝoĉo" anstataŭ Joĉo, "ĝunipero" kaj multaj aliaj. La artikigado de s-ro Zeska estas klara, martela, — sed pluraj vortoj restas nekompreneblaj, ĉar misprononcitaj. Kiam kanzonisto anstataŭ la jes kantas "jeŝ", tio ŝokas, tamen estas tolerebla, sed la deklamo devas esti prononce senriproĉa.

La eldonejo nomas flankon de la sondisko — "paĝo". Ve, germanismo!

Resume: malrekomendinda eldonaĵo. Tiu ĉi esperantaĵo ĉagrenos progresintojn kaj misinstruos komencantojn. Se intertempe AEF fininstruis al Filipino Zeŝka la Internacian Lingvon, valorus la penon reeldoni ĉi tiun diskon.

Mendu ĉe UEA: 3,— gld. + sendokostoj 10 %.



Zeska:
majstras
metion sed
ne
Esperanton

GANDHI KAJ LIA

Recenzas Jonathan Pool (Chicago):

Vivo de Gandhi, de Edmond Privat. La Laguna: Régulo, 1967 (1968). 159 p. Ilus. 19 cm. (Beletraj kajeroj, n-ro 32).

Kial Gandhi, pacisto, malaprobis intencan mispafadon dum milito? Kial Gandhi, ribelisto, haltigis tuthindujan liberiĝo-movadon? Kial li ne toleris suferigon sed propagandis suferon? "Vivo de Gandhi" temas grandparte pri la "ismo" de Gandhi: principaro kiu (ŝajne) postulis ian certan agon en ĉia ajn situacio. Per abundaj ekzemploj el lia vivo, Privat, kiu mem iom kunvivis kun li, iompostioe instruas al ni tiun principaron, mal-facile kompreneblan kaj al la hindaj kaj al la anglaj samtempoj de Gandhi. Jen ni vidas, ke li religiece sekvis, kaj sekvigis al aliaj, siajn idealojn spite de la rezultoj; sed ni legas (p. 100) lian klarigon, ke praktika sukceso venas nur per agado laŭ tiu ismo.

Privat kelkloke ekstraktas la konfliktojn inter la mondvidoj de hindoj kaj angloj (p. 63) aŭ de Gandhi kaj liaj sekvantoj (p. 72). Sed iom neplene analiziĝas la problemoj estiĝantaj, kiam unu sama homo estas kaj la Ideologilisto kaj la gvidanto de revolucia movado. Estas tamen nature, ke mallonga libro, originale disaŭdigita de la aŭtoro kiel radio-prelegetaro, sukcesas ĉefe ekkonigi kaj scisoifigi nin pri la koncerna temo (pri kiu ĝi rekomendas aliajn legaĵojn ĉe la fino). "Vivo de Gandhi" tion faras elegante kaj atentokapte.

Mendu ĉe UEA: 7,20 gld. + sendokostoj 10 %.

Medicinaj hipotezoj

Recenzas André Albault (Francujo):

Esenco de la problemo pri la maljuniĝo, de Dza Trang. Saigon: La aŭtoro, 1968. 16 f. Mimeo. 27 cm.

Laborhipotezoj pri l' mekanismo de maljuniĝo (variado de l' korpa solvaĵo; kolektiĝo de kelkaj saloj kaj kolesterolo ktp.) kaj sekve propono de farotaj esploroj kaj de "rejunigaj metodoj".


Aplaŭdinda laboro: se nur tiaj povus multiĝi en nia lingvol Bedaŭrinde kritikinda estas la prezento: (akcesore la preso ja!) sed precipe kaj plej grave lingvaĵo kaj eĉ gramatiko. La vorto podagro eĉ ne estas konata.

Unu demando: ĉu tia malampleksa teksto ne trovas la pli vastan efion, kiun ĝi meritas, se ĝi — post serioza korektado — aperus en revuo: la "Scienca" aŭ la "Medicina Internacia"?

Mendu ĉe UEA: 0,80 gld. + sendokostoj 10 %

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.

PRINCIPARO



Gandhi kaj gesin'oroj Privat sur ŝipo al Hindujo en 1931

Hezitiga legolibro

Recenzas Francisko Simonnet (Francujo):

Interesa legaĵo; Internacia legolibro. Komp. Aleš Berka. Vsetín: Krouzek esperantistu pri SZK Sklár, 1967 (1968). 124 p. Frontispico. 21 cm.

Jen pli ol kvardek diversaj tekstoj, poeziaj aŭ prozaj, popolaj aŭ verkistaj, Esperante verkitaj aŭ el la rusa, norvega, "floresa", bulgara, "skota", slovaka kaj ĉeĥa tradukitaj. La pli multajn el la netradukitaĵoj verkis ĉeĥoj, kion oni forte sentas. La tuto ja estas "Internacia", iom simile al multaj samadjektivaj kongresetoj. Ĉu "interesa"? Post hezito mi respondas jese. Verdire ne temas pri literaturo (el la prozaĵoj nur "Virino de la vojoj" de R. Macdonald Douglas kaj "Kolekto da poŝtmarkoj" de K. Čapek eble estus post vortkorektoj saveblaj), sed oni multon legas sentede kaj kelkajn erojn kun plezuro aŭ emociiĝo. Bedaŭrinde oni devas la tekstaron nepre malkonsili kiel "legolibron" por novaj esperantistoj, pro multegaj preseraroj gravaj kaj malgravaj, pro stilaj mallertaĵoj kaj malsimplaĵoj, pro tro da vort- kaj fraz-faraj malkorektaĵoj, pro tro multaj radikoj neesperantaj, klujn oni troĝentile nomadas neologismoj, kaj pri kiuj almenaŭ tio staras ekster debato, ke en "legolibro" ili ne troviĝu.

Mendu ĉe UEA: 5,— gld. + sendokostoj 10 %.

Laste aperis

La ĉi-monata rikolto da novaj eldonaĵoj dividiĝas tre facile en tri faskojn: politikaj, Esperantaj kaj beletraj.

Nova poemaro originala

La ĉefa beletraĵo estas la unua originala poemaro en Esperanto de Vesna Skaljer-Race, kiu jam aperigis serblingvajn volumojn. La 60-paĝa ilustrita libreto havas la titolon "Maristo surmaste". Okaze de la enoficiĝo kiel lektorino de Esperanto en la universitato de Amsterdam f-ino A. J. Middelkoop prelegis pri humuraj trajtoj en la Esperanto-literaturo. Ŝia prelego jam atingis la duan eldonon en la nederlanda lingvo sub titolo "Humoristische trekken in de Esperanto-literatuur". Ĝi kostas 2,— gld. Sampreza pri-literatura verko estas "Konciza historio de la kornvala lingvo kaj ĝia literaturo" de G. H. Sutton. La kornvala estas mortinta lingvo kelta. Bonvene represita en Japanujo: la biografio "Zamenhof" de E. Drezen. Bele multobligita, ĝi kostas 2,40 gld. Alia japana eldonejo, Amo-Akademio, kolektis paroladetojn de konataj personoj sub la titolo "La voĉo de albumo". El tiu materialo jam aperis kelkaj diskoj, kaj nun aĉetebla estas 370-metra sonbendo. (Oni turnu sin al la magnetofona servo de UEA).


Dua volumo de Szerdahelyi

La Esperantaj eldonaĵoj inkluzivas novan Ŝlosilon (sed ne miniaturfoman) — por sinhaloj; duan eldonon de la konata "Research bibliography on Esperanto" de Tonkin (1,50 gld.); kaj la plejparte korelingvan kolekton de esperantologiaj studoj "Verkaro de Hengwi Hong". Sed la ĉefa novaĵo estas la longe atendita dua volumo de la rektameta lernolibro de István Szerdahelyi, speciale verkita por infanoj 10-14-jaraj. La 227-paĝa volumo, bone ilustrita, havas kelkajn hungarlingvajn klarigojn, sed taŭgas por internacia uzo. Internacia laŭ intenco estas alia rektameta lernilo, "Ĉu vi parolas tendare?" (tieli) Subtitolo: bildkurso por labortendaroj. Ellaboris ĝin Itala Esperantista Junularo. Kolektantoj de Kongresaj Libroj alte ŝatos tiun de la ĉi-jara hispana kongreso, kun unuarangaj kolorbildoj pri Kanarioj, kie ĝi okazis. Ankaŭ la Kongresa Libro de la 54a UK en Helsinki estas mendebla por kolektantoj, po 5,— gld.

La politika breto pli pleniĝas per 3 verkoj de Maŭ (unu el ili estas jam la 3a Esperanta eldono!) kaj unu de Lin blaŭ. Kontraste al la Fremdlingva Eldonejo en Pekino, la Internacia Konfederacio de Liberaj Sindikatoj (sidejo: Bruselo) unuafoje eldonis en Esperanto. La ilustrita broŝuro kostas 0,78 gld. kaj nomiĝas "IKLS: Kio ĝi estas, kiel ĝi funkcias, kion ĝi faras".

Restas menciil la novajn turismajn prospektojn: pri Kralice (Ĉeĥoslovakujo), apud Trebič, kaj pri Aŭstrujo ĝenerale, "Bonvenon en Aŭstrujo!" Interesitoj petu ilin de la turismaj instancoj (vidu en Jarlibro 1969/I).

FORPASO DE DU ĈEFDELEGITOJ



JAROSLAV ŠUSTR (1901-1969)

La 8-an de septembro 1969 mortis en Praha, post grava malsano, Jaroslav Šustr, peranto kaj poste ĉefdelegito de UEA de post 1956, honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj honora prezidanto de Esperantista Klubo en Praha, diplomito pro merito de la Ministerio de Edukado de Gvatemalo kaj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, unu el la plej elstaraj personoj de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakujo.

Lerninte Esperanton en sia 16-a aĝojaro, li plenumadis plurajn gravajn funkciojn en la movado, kiel komitato de landa asocio, delegito kaj ĉefdelegito de UEA, prezidanto de la Esperantista Klubo en Praha dum 28 jaroj, peranto de Esperanto-eldonaĵoj por Ĉeĥoslovakujo kaj aliaj orient-eŭropaj landoj, ofte sub malfacilaj kondiĉoj, prizorganto de vasta informa servo, ktp. Esperanto-biblioteko kun 4 800 volumoj de li dum jardekoj kolektitaj estos daŭra monumento pri la nomo kaj laboro de Jaroslav Šustr.

Daŭre kaj senprofite labori por la Lingvo Internacia estis lia vivotasko, al kiu li dediĉis ĉiun liberan tempon. "Ĉion, kion mi faris kaj faras, mi konsideras mia devo, kiun cetere plenumus ĉiu el vi." Tiel li skribis en 1969 al ĈEA. Lia forpaso estas perdo grava por la tutmonda movado kaj nekompensebla por la movado en Ĉeĥoslovakujo.

ROMAN SAKOWICZ (1888-1969)

Roman Sakowicz, la multjara ĉef-delegito de UEA por Polujo, forpasis la 2an de septembro. Ĉe la enterigo, la 4an de septembro en urbo Nowa Sól, funebran paroladon en la pola kaj en Esperanto faris en la nomo de Pola Esperanto-Asocio kaj de UEA s-ro Aleksy Lasinski, delegito en Vroclavo. Roman Sakowicz lernis Esperanton jam en 1905. Kiel gimnaziano li persone ekkonis d-ron Zamenhof. Li estis tre malnova membro de UEA, peranto kaj ĉefdelegito ekde la fino de la Dua Monda Milito kaj delegito en Nowa Sól ekde 1956. Lian

eminentecon en la jurista profesio substrekis la ĉeesto de multaj lokaj advokatoj ĉe la enterigo. 'Li parolis Esperanton kiel la polan' — diris s-ro Lasinski — "ĉar li amis la Internacian Lingvon same, kiel la gepatran".



Roman Sakowicz,
ĉef-delegito de
UEA por Polujo
dum pli ol 20 jaroj,
fotita dum kunveno
en Nowa Sól.

VILHO VÄISÄLÄ (1889-1969)

La 12-an de aŭgusto — nelonge post la fino de la 54a Universala Kongreso, en kiu malsano malebligis al li funkcii kiel rektoro de ISU — mortis prof. d-ro Vilho Väisälä, iama prezidanto de Finnlanda Scienca Akademio. Vilho Väisälä lernis Esperanton en la unuaj jaroj de nia jarcento. En sia scienca vivo li estis pioniro en la esplorado de la vetero kaj atmosfero. En Finnlanda Scienca Akademio li estis membro ekde 1932, estrarano en 1959-62, prezidanto en 1960-61. Li estis internacie konata en sia fako kaj aktiva en pluraj Internaciaj meteorologiaj instancoj. En la lastaj jaroj lia iniciato ebligis la instruadon de Esperanto en la Universitato de Helsinko. Li estis Dumviva Membro de UEA.

GABRIELLE NIX (1883-1969)

La 7an de aprilo 1969 mortis en Romsey, Britujo, s-ino Gabrielle Nix. Gesinjoroj Nix (belgino kaj anglo) estis inter la unuaj geedzaj paroj, kies komuna lingvo estis Esperanto. Ŝi restis ilia sola hejma lingvo dum pli ol 50 jaroj. La tomboŝtono portas epitafon en la sama lingvo.

JOAO BAPTISTA MELLO E SOUZA

Prof. d-ro J. Baptista Mello e Souza mortis 81-jara la 27an de aŭgusto. Li estis la unua sekretario de Brazilia Esperanto-Ligo ekde ĝia fondiĝo en 1907. Ekster la movado li estis konata kiel prezidanto de la Federacio de Brazilaj Skoltoj.

GEORGE FALGIER (1910-1969)

Forpasis en St. Louis, Usono, s-ro George Falgier, la 16-an de aŭgusto 1969. Li fondis la grupon en St. Louis, gvidis multajn kursojn kaj estis dum jaroj fak-delegito de UEA.

Turkoj en Nederlando

Dum la nokto de la 7a de aŭgusto 1969, rabistoj atakis turkon sur la stacidoma placo de Hago, Nederlando kaj per piedbatoj grave vundis lin ĉe la reno. Preterpasantoj, kiuj poste aŭdis la vokojn de la vundito, nenion komprenis el la turkaj vortoj kaj supozis, ke li estas ebria. Li kuŝis longe sur la strato sen helpo. (Laŭ la gazeto "Haagsche Courant")

Alia turko en Nederlando scipovis eltiri profiton el la lingva problemo. Dum du jaroj li sukcesis ŝofori aŭton en Nederlando sen legitimilo. Lia sola "permesilo" estis turklingva menu-karto, kiun neniu policisto komprenis, sed kiu aspektis konvene oficiala. (Laŭ la gazeto "Tijdschrift voor Overheidsadministratie")

Kalkuli la monon

Skribas Jozefo Wohlberg (Israelo):

Antaŭhieraŭ mi ricevis presaĵon de UEA. Hieraŭ mi ricevis novan presaĵon — "voĉdonilon B". Ĉu ne estas malprofito por UEA sendi 2 presaĵojn aparte, unu tagon post la alia? Se oni sendus ilin kune, oni ŝparus la poŝtajn spezojn. Ĉu en movado malriĉa, kiel la nia, oni ne kalkulas la monon?

Respondas la redaktoro:

En tiu ĉi kazo, kvankam la alvendo diferencis per nur unu tago, la ekspedo diferencis per ĉ. 40 tagoj, ĉar unu cirkulero iris aerpoŝte, la alia mare. Tamen principe povas okazi, ke la Centra Oficejo sendas du diversajn cirkulerojn al unu sama persono en la sama tago — per apartaj kovertoj. Kial?

La adresaroj troviĝas en difinitaj grupoj. Supozu, ke ni ekspedas unu cirkuleron al delegitoj de UEA kaj samtempe alian cirkuleron al abonantoj de "La Praktiko". Estus eble traserĉi la du adresarojn kaj kombini la sendaĵojn al tiuj personoj, kiuj troviĝas en ambaŭ grupoj. Sed la laboro de serĉado en multaj tiaj kazoj kostus pli, ol la ekstra afranko de la apartaj kovertoj. Necesas kalkuli la monon, ne nur ĉe la afranko, sed ankaŭ ĉe la salajroj! Plej efika estus aŭtomata elektado de la adresoj laŭ diversaj kategorioj — sed, laŭ konsiloj de fakuloj, la konsisto de la adresaroj de UEA estas tia, ke aŭtomata sistemo kostus pli, ol ĝi ŝparus.

La ekspedejo de la Centra Oficejo ĉiujare forsendas dek-milojn da presaĵoj kaj cirkuleroj plej ekonomie.



ILO kaj Esperanto

Demandas Leo Jolliet (Germanujo):

La artikolo "ILO 50-jara" en la n-ro 763 de la revuo "Esperanto" tre Interesis min. Bedaŭrinde mi ne trovis en ĝi mencion, ĉu ILO ankoraŭ nuntempe kiel en la jaroj 1921 ktp. aplikas ankaŭ Esperanton.

Respondas la redaktoro:

Laŭ nia scio, bedaŭrinde ne.

Idealismo sonas bele

Skribas Cécile Pérez (Francujo):

Permesu al tre malnova legantino vin gratuli pro la ĉiam pli interesa prezento de via gazeto, kiu fariĝas pli kaj pli alloga.

Bonvolu ankaŭ permesi al mi respondi koncerne vian artikolon "La malkresko de Idealismo". Kiu kulpas pri tiu malkresko, ĉu ne la esperantistoj mem? Mi ne forgesis la malgajigan kaj jam tre malproksiman tempon, kiam esperantistaj rondoj decidis "ne plu pri idealismo por esti tute neŭtralaj"!!

Kiam oni petas min diri ion en Esperanto por aŭdi, kiel ĝi sonas, mi respondas: "Jen la saluta frazo de d-ro Zamenhof ĉe la unua esperantista kongreso: Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio!" — La unua rimarko estas: "Ĝi sonas tre bele", kaj post la traduko oni admiras kaj ofte entuziasmiĝas kaj kelkafoje esperantistiĝas!

Poemo ne zamenhofa?

Skribas Isaj Dratwer (Israelo):

Ĝuste mi trovis en la gazeto "Voshod", 1884, n-ro 45, p. 1302, la ŝercan versaĵon "El juĝeja kroniko", subskribitan per la latina litero "Z", tradukis ĝin Esperanten kaj kune kun la rusa teksto sendis ĝin al s-ro Holzhaus. En aliaj numeroj de la sama gazeto mi trovis ankaŭ kelkajn recenzojn subskribitajn per la sama litero. Tamen, krom la menciitaj versaĵoj kaj artikoloj aperis kelkaj korespondaĵoj el urboj, kie neniam estis Zamenhof, ankaŭ ili subskribitaj per la litero "Z". Tial mi dubas, ĉu la menciita ruslingva versaĵo estis vere verkita de Zamenhof. Pri mia dubo kompreneble mi informis s-ron Holzhaus. Absolute mankas ia ajn konfirmo, ke sub la litero "Z" kaŝis sin la estonta kreinto de Esperanto.

Kion signifas "mortigi"?

Skribas Aleksy Lasinski (Wroclaw):

Kun granda miro mi tralegis en la junia numero de "Esperanto" (p. 106) la titolon KLEMENSIEWICZ MORTIGITA. La eminenta kaj en Pollando vaste konata filologo ne estis ja mortigita (kio sinonimas kun murdita), sed li PEREIS en aviadila akcidento, kiel prave mencias la redakcio.

Respondas la redaktoro:

Ni ne komprenas la vorton "mortigi" kiel sinonimon de "murdi". La mortigo ja povas esti intenca aŭ hazarda, kaj povas kaŭzi ĝin homo, aviadilo aŭ kio ajn. Ni tamen konsentas, ke PEREIS estus pli konvena vort-elekto.

Ĉeĥoslovakujo

- La naŭa Internacia renkontiĝo en Podebrady (4-6 julio 69) ricevis pli ol 100 partoprenantojn el Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Nederlando, Polujo, Svedujo kaj Usono. Venontjare okazos ĉirkaŭ la sama tempo Esperanta ŝak-turniro.
- Internacia Konferenco pri J. A. Komensky (la granda pedagogo-filozofo, kiu verkis ankaŭ pri internacia lingvo) okazos en Prerov, Ĉeĥoslovakujo, de la 25a ĝis la 30a de julio 1970, do tuj antaŭ la UK en Vieno. Petu faldfolion de Muzeum J. A. Komenského, PhDr. Gustav Vozda, Horní nám. č. 1, Prerov.

Germanujo

- En Aachen okazos de la 27a ĝis 31a de marto 1970 komuna kongreso de la belga, germana kaj nederlanda landaj asocioj. Temo: "Lingvaj problemoj en Eŭropo". Informas detale: Trilanda Esperanto-Kongreso, D-51 Aachen, Karl-Marx-Allee 172.



D-ro A. Poška raportas en Ziemeri (vidu: Soveta Unio)

Grekujo

- Aperis la unua numero de nova presita Esperanto-gazeto el Ateno, "La voĉo de Esperanto en Greklando". Eldonas ĝin dumonate Esperanta Societo de Heleninoj, Sokratous 48, Ateno (101). Redaktas Sokrato Sakellaropoulos.

Hindujo

- Laŭ rezolucio de la leĝfara instanco de Bengalujo de 14 aŭgusto 1969 komenciĝas nun efektivo de la leĝo de 1961 pri oficialaj lingvoj de Okcidenta Bengalujo, laŭ kiu la bengala estas uzenda por oficialaj laboroj. Precipe en la mal-

superaj kortumoj la bengala lingvo nun tuj forpuŝos la anglan.

Hispanujo

- Novan prezidanton de HEF (s-ron A. Figuerola) elektis la Hispana Kongreso en Kanariaj Insuloj komence de julio. Ĉeestis ĉ. 150 el 285 aliĝintoj. Prof. Sancho-Izquierdo fariĝis honora prezidanto de HEF, kaj la federacia sidejo transiros ekde januaro 1970 de Zaragoza al Madrid.
- Esperanto-stando en la Foiro de Barcelono ĉijare distribuis 4000 flugfoliojn kaj disvendis 400 lernolibrojn kaj vortarojn, precipe la poŝvortaron de eldonejo Sopena.

Italujo

- Ankaŭ ĉijare la turismaj instancoj de Rimini aljuĝis al geedzaj paroj el tuta Eŭropo senpagan restadon en Rimini en konkurso "Miela luno en Rimini". Kaj ankaŭ ĉijare gajnis tri paroj (el 35), kiuj havas Esperanton kiel komunan lingvon: Nora kaj Florin Caragea (Germanujo), Eleonora kaj Alex-Bubu Tausciuc (Rumanujo) kaj Zuzana kaj Aleš Bednarik (Ĉeĥoslovakujo).

Malajsio

- La angla lingvo ĉesos esti la ĉefa lingvo instruata en mezgradaj lernejoj kaj universitatoj de Malajlando. Ekde 1978 la ekzamenoj por eniro en universitaton estos nacilingvaj. Nuntempe la angla estas la instrulingvo por pli ol la duono de la infanoj en ŝtataj mezlernejoj de Malajsio.

Rumanujo

- Tri alilandanoj kaj 113 rumanoj partoprenis bone organizitan renkontiĝon en Covasna la 17an de aŭgusto kun relative vasta Esperanto-ekspozicio.

Soveta Unio

- En la soveta respubliko Litovujo, kiu pionire enkondukis la instruadon de Esperanto antaŭ ne longe ("Esperanto", marto, p. 42), jam multaj lernejoj havas Esperanto-kursojn. Interesiĝo kreskas ankaŭ en la najbara respubliko Latvujo, kaj en lernejo de Ziemeri okazis de la 17a ĝis la 24a de majo Esperanto-semajno kun konferenco pri Esperanto-instruado. (Foto)

Svisujo

- Jam la 13an fojon okazos jarfine (26 decembro-4 januaro) skiferioj ĉe Adelboden, Svisujo. Partopreno estas limigita je nur 23 personoj, do la interesoj rapidu peti detalojn p/a Kultura Centro Esperantista, Miéville 133, CH-2314-La Sagne, Svisujo.

Usono

- Esperanto Information Center (de ELNA) jam

Tutkorajn gratulojn kaj bondezirojn

ni direktas al la prezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, okaze de lia sesdekjara datreveno je la 5a de novembro 1969! Sciante, kiom da estimo ĝuas profesoro Lapenna tra la tuta Asocio kaj la tuta Esperanto-movado kaj kiel alte taksata estas lia plurjardeka konscienca kaj inspirita laboro por la Internacia Lingvo, ni ne hezitas esprimi ĉi tie niajn plej sincerajn bondezirojn ne nur en la nomo de ĉiuj liaj kunlaborantoj, sed ankaŭ en la nomo de la tuta Asocio kaj movado. Samtempe, kaj same varme, ni salutas ankaŭ la honoran prezidanton de UEA, s-ron Ernfrid Malmgren, okaze de lia 70-jara datreveno la 3an de de novembro 1969!

PERSONE

Dekstre:
la moderna
inĝeniera lernejo,
kiu funkcias kiel
kongresejo por la
trilanda kongreso en
Aachen (vidu: Germanujo)



distribuis 2 500 ekzemplerojn de la nova broŝuro de Mario Pei al universitataj k.s. bibliotekoj, kune kun la nova 18-paĝa librokatalogo de EIC.

Vjetnamujo

- Al 100 personoj prelegis aŭstralia ambasadoro Ralph Harry laŭ invito de Esperanto-Grupo de Sajgono. La franclingvan paroladon sekvis interpretado en la vjetnaman. Rezulte okazas kurso por 60 plenaĝuloj.

FAKE

Armeo

- Majoro H. W. R. Petersen (180 Onepu Road, Lyall Bay, Wellington 3, Nov-Zelando) formis laborgrupon por ellaboro de nova, moderna militista terminaro en Esperanto. La terminaro ampleksos la teran, maran kaj aeran armeojn, kaj ĉiuj fakuloj estas invitataj kunlabori.

Bibliofolio

- La libron "Opuscles et fragments inédits de Leibniz" reprenis firmo Georg Olms, D-32 Hildesheim, Am Dammtor, Germanujo. Ĝi kostas 82 g.m. El la libro evidentiĝas, ke Leibniz prilaboris du projektojn: scienca, filozofia lingvon kaj internacian paroleblan lingvon sur latina bazo.

Pied- kaj kor-varmiga dancado estas necesa sed agrabla parto de la programo de la skiferioj en Adelboden (vidu: Svisujo).



Geografio

- Eldonejo Kartografické Nakladatelství en Prago anoncas la eldonon en 1970 de "Poŝ-atlaso de la mondo". Laŭ prospekto ĝi enhavos 41 kolorpresajn mapojn, 82 paĝojn da informa teksto kaj 10 000 urbonomojn. En diversaj lingvoj ĝia eldonkvanto jam atingis unu milionon.

Pupteatro

- En Zagreb, en la kadro de la Dua Internacia Esperanto-Festivalo de Profesiaj Pupteatroj (4-9 oktobro 1969), ludis jam la trian fojon en Esperanto antaŭ internacia publiko la Hungara Ŝtata Pupteatro: verkon de Zoltán Jékely, "La ora ŝlosilo", laŭ fabelo de A. Tolstoj.

Radio-amatoroj

- Jam pli ol 180 fojojn interparolis la pacifika radio-amatora rondo, konsistanta el Esperantaj elsendiloj en Havajo, Meksiko, Nov-Zelando. La konversacioj daŭras ĉiutage duonhoron. (Vidu "Esperanto", novembro 1968, p. 170).

Turismo

- Aperis jam la unua, grandformata numero de "Turista mondo", lanĉita de la nova komisiito de UEA por turismo, d-ro Hj. Unger (Svisujo). (Vidu "Esperanto", majo, p. 80-81.) Abonojn po 8,50 gld. jare peras UEA.

PERSONE

Isaac

- D-ro Nassif Isaac, delegito de UEA en Kairo, elektiĝis estrarano de la Internacia Spiritista Konferenco por la periodo 1969-1972. En la antaŭnelonga, 27-nacia konferenco en Glasgow d-ro Isaac prelegis pri Esperanto kaj proponis ĝian uzon kiel oficiala lingvo de la konferenco.

Jonas

- Fine de septembro aperis en Aŭstrujo speciala poŝtmarko du-ŝilinga okaze de la 70-jara datreveno de Franz Jonas.

Savir

- Inĝ. Moshe Savir el Israelo instruis Esperanton en la someraj universitatoj de Turku kaj Jyväskylä (Finnlando) dum julio 1969.

Snarberg

- Vic-delegito Jack Snarberg el Stokholmo faris flugviziton al Japanujo, Honkongo kaj Hindujo en junio por komerco pri perloj kaj juveloj. Ĉie li utiligis nur Esperanton kaj la delegitan reton de UEA por efektiviigi la kontaktojn.

LA 25A JUBILEA KONGRESO DE TEJO

AKTIVIGA KONGRESO

Vere aktiviga estis la Internacia Junulara Kongreso de TEJO, okazinta de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto en la stokholma antaŭurbo Tyresö. Ja estis jubilea kongreso, la 25a, sed la aranĝantoj tute ne allasis retrospektivon. Ĉio dum tiu semajno tuŝis la nunon. Jam la formo de la programo estis freŝe moderna: sub la temo "Junularo kaj socio" okazis pluraj prelegoj sekvataj de grupaj diskutoj. Per divido en grupojn oni sukcesis aktivigi la partoprenantojn. Unu el la prelegantoj estis Ivo Lapenna, kiu faris rapidan viziton ĉe la kongreso.

Tamen ne nur la prelegoj kaj diskutoj estis konformaj al la ĝenerala temo: Junularo kaj socio. Eĉ la festparolado de Humphrey Tonkin koncernis ĝin. Tie esprimiĝis — same kiel en multaj aliaj paroladoj, diskutoj kaj debatoj — ke la junaj esperantistoj devas celkonscie agi kontraŭ lingva kaj kultura imperiismo. Temas fakte pri ideologiigo, sed tiu ĉi ideologio tute ne egalas al la antikva verdstelula idealismo.

KVIETA MANIFESTACIO

Unu aranĝo — eble la kulmino de la tuta semajno — bone esprimis tiun ideologion per metodo konforma al la ĝenerala tendenco en la kongreso.

Sabate granda plimulto de la kongresanoj iris en la centron de Stokholmo por fari manifestacion. Iliaj tabuloj tekstis svede: "Per Esperanto kontraŭ lingva diskriminacio", "Multlingveco kostas" k.a. Krome estis serio da tabuloj, kiuj diris: "Le français et l'espéranto en France", "Polski i esperanto w Polsce", "English and Esperanto in England" ktp. en multaj lingvoj. Verŝajne pro tiuj tabuloj la manifestaciantoj ekhavis bonajn kontaktojn kun alilandaj turistoj. Eĉ la japana kaj araba ŝildo aliris interesitojn el la koncernaj landoj.

GEFRAŬLOJ (!) ESPERANTO

Dum la kongresa balo oni kiel kutime elektis Fraŭlinon Esperanto de la jaro. La ĉi-jara fariĝis Claude Nourmont el Aix-en-Provence en Francujo. Krom pro sia ekstero ŝi estas konata kiel antaŭa vicprezidanto de STELO. La kandidatinoj plej proksimaj al ŝia titolo venis el Nederlando kaj Kanado. Por montri sian emon al seksa egaleco oni ankaŭ — iom pli ŝerce — elektis Fraŭlon Esperanto.

HO, LA SVEDINOJ ...

La komitato havis tri kunsidojn dum la kongreso. La plej viglajn diskutojn kaŭzis — krom puraj

formalaĵoj — la gazeto Kontakto kaj la t.n. unu-gazeta plano. La komitato ankaŭ elektis novan prezidanton de TEJO, Humphrey Tonkin. Lin anstataŭas kiel ĝenerala sekretario Senad Ĉoliĉ. En la elektoj ankaŭ montriĝis, ke la komitato eksciis la bonojn de la svedaj virinoj... Lastjare elektis la unua estraranino de TEJO — svedino.



Ankaŭ Fraŭlino Esperanto volus havi foton de si mem... La plej nova en la serio da ĉarmulinoj skarpumitaj en TEJO-kongresoj ekde Wokingham en 1961 estas STELO-aktivulino Claude Nourmont el Francujo. Sed ĉi-jare la IJK elektis ankaŭ Fraŭlon Esperanto. Lia nomo ne estas malkaŝita.

ORATORIOJ KAJ ALIAJ GAJULOJ

La ĉeestantoj havis abundajn eblecojn aŭdigi siajn voĉojn. Krom en la diskutoj ili povis paroli ankaŭ en la oratoria konkurso. Tion faris kvin junuloj el kvin landoj. La unuan premion gajnis Zlatko Tišljar el Zagrebo per sia maratona plendado "Kial mi ne estas kontenta pri tiu ĉi kongreso". Sed eĉ skribe oni povis esprimi sian opinion libere. Ĉiutage nova paperego estis gluita al muro en la kongresejo. Tie oni skribaĉis ĉiajn spritaĵojn, fiaĵojn, stultaĵojn kaj iufoje eĉ — saĝaĵojn.

La kongresanoj do ankaŭ bone amuziĝis. Dum la t.n. distra vespero okazis diversaj gajaj ludoj. Interalie oni konkursis pri la ĉampioneco de "vagabonda ŝako". Kelkaj svedoj eble pensis ke tio estas sveda ludo. Nu, estu kiel ajn, ĉiukaze la venkinto venis el Japanujo! En alia vespero la kongresanoj ĝuis teatraĵojn, kiujn prezentis gestudentoj el Zagrebo.


Sed ankaŭ tiu ĉi aktiviga kaj gajiga kongreso havis finon. Aŭ kiel iu skribaĉis sur la muro: Eĉ fuŝaĵoj finiĝas. La partoprenintoj iom-post-iom revenis al siaj pli ol dudek landoj. Memorante pri la 25a IJK, la ideologia, la manifestacia, la junular-kaj-socia kongreso.

Sten G. Johansson

SURVOJE AL VIENO

La 55a Universala Kongreso ne invitas vin nur al Vieno — nek Aŭstrujo signifas nur la montaron, kiun reklamas la vojaĝ-entreprenejoj. Ekkoni iun landon pere de Esperanto signifas ion tute specialan, kiel tion proprahaŭte spertis jam multaj miloj da vojaĝantoj. Kaj ĝi signifas por tiuj, kiuj iras kongresi en Vieno, eblecon survoje freŝiĝi en paca pejzaĝo el preĝejoj, kabanoj, gastejoj, frukt-arbaroj kaj glaciaj montoj. Tipa estas jena vojeto tra valo en Vorarlberg — ekstrema-okcidenta Aŭstrujo.

Kaj por tiuj, kiuj iros al Aŭstrujo unuavice por libertempoj, la Universala Kongreso donas ŝancon amikiĝi per Esperanto kun ĝia popolo, samtempe ĝuante la riĉan kulturan kaj festan programon kaj unikan etoson de la UK. Vin ĝi konatigos intime kun Vieno, "ĉefurbo de arto kaj muziko", en kies koro troviĝas ĉiuj kongresaj ejoj: la kongresejo Sofiensäle, inaŭgurejo Stadthalle, teatro Raimund. La panoramo dekstre havas kiel centron la katedralon de Sankta Stefano, proksime de Hofburg.



OFICIALA INFORMILO

N-ro 427, 1 septembro 1969

NOVA ĈEF-DELEGITO

Britujo: S-ro Grahame L. Smith, "Holstein House", 801 St. Albans Road, Garston, Watford, WD2 6LA.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de decembro neniu membro protestas pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Aŭstralio: Heber Petley, Toowoomba. **Brazilo:** Carlos Rezende, Belo Horizonte; Aderaldo Rocha, Itabuna; Maria De Angelis, Potirendaba. **Ĉeĥoslovakio:** Vlasta Obručová, Olomouc. **Danlando:** Benny Nielsen, Naestved. **Francujo:** Alphonse Legret, Vire. **Hindujo:** Seoti Prakash, New Delhi. **Hispanujo:** Luis Ramírez Teruel, Alicante. **Israelo:** Jinon Meiri, Kirjat Tivon; Josef Wohlberg, Natanya. **Italujo:** Giuseppina Gamberini, Germano Gimelli, Franco Tangianu, Bologna; Nino Vessella, Cassino/Roccaseca; Dino Fabris, Cittadella. **Nederlando:** Geoffrey Sutton, Rotterdam; Engelbert Wals, Heemskerk. **Nov-Zelando:** Pat Williams, Rotorua. **Pollando:** Erazm Nawrowski, Gdynia. **Svislando:** André Dubois, Bienne. **Usono:** Charles Witt, Santa Monica.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1969)

Aŭstrujo: Graz (VD). **Brazilo:** Belo Horizonte (VD); Rio de Janeiro (FD lingvistiko, parapsikologio). **Britujo:** Stockport. **Francujo:** Bondy; Marseille (VD). **Germanujo:** Passau; St. Peter-Ording. **Nederlando:** Sevenum; Winkel. **Svedujo:** Skövde (FD sociaj aferoj). **Usono:** Pasadena.

NOVA DUMVIVA PATRONO

González Cantero, s-ro Pedro, Madrid, Hispanujo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Naemura, s-ro Kenji, Tokio, Japanujo.
Teneva, s-ino Penka, Sofia, Bulgarujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1969

269 Banham, s-ro F. R., Aŭstralio. 270 Trarbach, s-ro A., Brazilo.

DONACOJ (Gld.)

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Germanujo: Dopp, s-ro A., 9,—.

Ĝenerala kaso: Germanujo: Eder, s-ro J., 3,98. Israelo: Giladi, s-ro J., 18,—. Japanujo: Itoo, s-ro E., 36,—. Svedujo: Fjordland, s-ro S., 2,22.

Internacia Arta Teatro: Nederlando: Verloren van Themaat, d-ro W. A., 7,90. Japanujo: Kaŭakami, f-ino T., 36,— (amiko-mecenato).

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

ANONCETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Amosevej 5 A, Kopenhago 2700 Brh. daŭre akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Kolektantoj! Petu informojn de la Esperantista Kolektanta Centra Informejo kaj senpagajn specimenon kaj anonceton de la fondinto: R. Melo, 15 rue Richelandière, 42 St. Etienne, Francujo.

Mi deziras kompletigi mian kolekton de "Nederlanda Esperantisto", "Skolta Mondo", "Svisa Espero", "La Internacia Fervojisto", "La Revuo Orienta" kaj "La Migranto". Bv. skribi al s-ro R. Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12 rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Volapük-bibliografio. Lige kun la redaktaj laboroj por la Enciklopedio de Esperanto ni kompilas kompletan bibliografion de la Volapük-literaturo. Ni petas pri sciigoj de Volapük-libroj aperintaj ekster Germanujo. Necesas indiko de ĉiuj bibliografiaj detaloj (aŭtoro, titolo(j), tradukinto, loko, eldonejo, jaro, paĝoj). Informojn sendu al: Reinhard Haupenthal, Am Bahndamm 12, D-6603 Sulzbach 1, FR Germanujo.

Klubo Paris 2000. Aliĝu al nia mondklubo de korespondado, kolektadoj, vojaĝoj, amikeco, ktp. Sendu aĝon, lingvojn parolatajn, vizaĝ-foton, ktp. Aliĝo senpaga. Abono al nia monata gazeto kun centoj da fotoj kostas 6 dolarojn aŭ saman valoron. Gekunlaborantoj estos bonvenaj. Skribu tre legeble al Klubo Paris 2000, B.P. 379-03, Paris R.P., Francujo.

S-ano Asztalos Iajos, Str. Cotita no. 2, Cluj, Rumanujo, deziras serioze korespondi, precipe pri geografio sed ankaŭ literaturaj temoj. Kolektas nuntempajn librojn, revuojn kaj landkartojn. B.k. kontraŭ ĉi tiuj sendas interŝanĝe ankaŭ p.m.

Por rekte-neprozelite: sociekumena interkonsento; spiritualhumanisma militanteco kaj kolegeco; inter diverse sociklasa-pensmanieraj laboristoj kaj civitanoj; per kelkmaterie internaciaj-amikaj rondkorespondaĵoj (doktrinbazo: Upsalo 1968; Vatikan-romo 1965, konstitucio "Ĝojo kaj Espero"); mi serĉas aktivsubtenan tutkonfesian dian-trinitatservan gealtigadojn. Skribu al: S-ro François Leeb, 25 bis, avenue J.-Claussat, F-63-Chamalières, Francujo.

**BRUEGANTAJ HORDOJ?
LONGHARULOJ?
NEBRIDEBLA JUNULARO?**

Kiel ajn vi rigardas la
junularon, vi legos pri
modernaj gejunuloj kaj
iliaj interesoj
en

Kontakto

La sola internacia junulara
revuo en Esperanto

kvaronjara

lukse ilustrita

simpla abono: 8 ned. gld. jare

lernejaj abonoj po 2,50 ned. gld. jare (minimume
dek abonoj sendataj al sama adreso)

por junaj individuaj membroj de UEA en kategorioj
JMA kaj MAK **senpage**.

KONTAKTO

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

LA GRANDA MALFRUO

de la juli-aŭgusta kaj septembra numeroj de "Esperanto" ŝuldiĝis al neglekto flanke de la bindejo-ekspedejo. La presejo finpresis la juli-aŭgustan numeron en la unua semajno de julio kaj la septembran numeron la 3-an de septembro, sed la bindejo ekspedis ilin nur en la dua duono de aŭgusto kaj septembro respektive. Kun tiu ekspedejo, same kiel kun tiu de la Jarlibro, la firmo Zwagers nun ĉesigis la rilaton, kaj la eldonaĵoj de UEA estonte estos ekspedataj el la presejo kaj/aŭ el la Centra Oficejo. Ni petas pardonon de la membraro kaj abonantoj pro tiuj gravaj prokrastoj estiĝintaj ekster la limoj de nia povo.

POR LA JARFINA SEZONO

Serio de 6 bondezirokartoj "MONDFAMAJ PEN-TRAJOJ" (Rembrandt, Da Vinci, Breughel, Renoir, Van Gogh, Utrillo), duoblaj kartoj, kun kovertoj.

Prezo: 3,75 gld.

+ sendokostoj 10 %

Mendu tuj ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Donacu libro-kartojn!

En multaj landoj ekzistas la bona kutimo donaci libro-karton aŭ libro-kuponon al siaj amikoj. La donacanto pagas iun sumon da mono al libro-vendejo kaj ricevas interŝanĝe specialan karton je tiu sama valoro. La karton li tiam sendas kun salutoj aŭ bonderizoj al iu amiko aŭ parenco. Tiu lasta, siavice, povas uzi la karton por aĉeti libron laŭ sia propra gusto kaj elekto.

Ankaŭ por Esperantaj libroj tiu metodo estas uzebla. Jam aperis specialaj, elegante presitaj donaco-kartoj je valoro de po 5,— guldenoj. La kartojn oni povas aĉeti kaj uzi ĉe la Libroservo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando). Oni pagas nur la efektivan valoron (5,— gld.) plus sendokostoj (10%). La kartoj havas la oportunan formaton A6 (105 x 148 mm).

Ĉu vi foje cerbumis, kian donacon sendi al via korespond-amiko eksterlanda? Kiel scii, kion li jam posedas, aŭ kiujn librojn li jam legis? La donaco-karto de UEA solvas tiun problemon! Via amiko povos mem elekti el mil diversaj eblecoj: libron, diskon, gazetabonon aŭ ion ajn mendeblan ĉe la Libroservo de UEA, ĝis la valoro de 5,— gld. (aŭ pluroble 5,— gld., se vi sendos plurajn kartojn).

La plej sukcesa disko de UEA



Prononc-instrua legado de 5 nacioj

JAM DUFOJE REPRESITA!


Kostas: nur 1,50 gld. (aŭ 1,70 gld. kun akompana teksto). Aldonu 10 % por sendokostoj.

VI POVAS HELPI


la laboron de UEA, pagante akurate vian membrokotizon por 1970. Eble vi trovos oportuna uzi por tio la mendofolion, kiun vi trovas en ĉi tiu numero de "Esperanto". Sendu ĝin, kune kun la pago, al via landa asocio, ĉefdelegito aŭ peranto, aŭ rekte al UEA en Rotterdam. La novajn kotizojn vi trovas en la septembra numero, sur p. 150. Ni memori-gas: MJ = 15,— gld.; MA aŭ MA-K = 30,— gld.; MS = 45,— gld.; J-MJ = 7,50 gld.; J-MA = 22,50 gld. Dankon pro la helpo!

esperanto

Unike uzebla varbilo el plasto. Ĝiaj detaloj: 24 x 5 cm, verdaj minuskloj sur blanka fono. La afiŝo estas surgluebla sur ĉiun ebenan surfacon. Sur aŭtomobiloj, fenestroj ktp. ĝi longe varbas por Esperanto. Prezo de 3 ekz.: 5,— GM. Mendu ĉe: Peter Welde, 2 Hamburg 61, Nordalbingerweg 65.



Ni solvis la problemon



kiel teni en bona ordo viajn ekzemplerojn de "Esperanto". Tiu ĉi bela bindilo permesas al vi aldoni en nuraj sekundoj ĉiun novan numeron de la revuo tuj post ĝia apero. Jam de la unuaj numeroj vi do havas pretan kolekton. Simpla sed efika sistemo certigas, ke la paĝoj kuŝas ebenaj por facila legado ĝis la meza rando. La bindilo konsistas el fortika kartono tegita per bonkvalita tolo, kun surprisitaĵaj titoloj kaj surglueblaj jar-ciferoj. Mendu nun: nur 5,— gld.!